

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO
WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO.

REDAKTANTOJ
REDAKTORZY

PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

Antaŭkongresaj pripensoj.

Ni estas antaŭ la Stokholma kongreso, kiu laŭnombre memorigas al ni la plej brilajn tempojn de nia movado. Kaj nun ekestas demando, pri kialo de la esprebla sukceso en hodiaŭaj krizaj tempoj.

La respondo povas esti nur unu: streĉita kaj konsekvenca laboro de niaj svedaj samideanoj donis sur grundo de unuecigita movado tiun forton, kiu ankaŭ povas por estonteco decidi. La taskoj de l' Stokholma kongreso krom la kutimaj ĉiujaraj estas speciale gravaj, ni pensu nur pli la definitiva unuecigo kaj akiro por la nova U. E. A. de ĝis nun ne aliĝintaj naciaj societoj, kio donus fine la longe deziratan harmonion en nia movado.

Kaj la gazetara demando? Jam delonge priparolas tiun problemon la redakcio de „Heroldo de Esperanto“ kaj ĝiaj multaj legantoj; ankaŭ Ĝeneva „Esperanto“ partoprenas en la diskuto. Plimulto de la diskutantoj opinias, ke la unuecigo de ambaŭ gazetoj povus havigi al nia movado vere valoran, oficialan gazeton kun ĉiam aktuala enhavo. Sed oni ne povas flanke lasi la pozicion de kelkaj vivipo-vaj naciaj revuoj. Solvo de la problemo ne devas okazi sen partopreno de la naciaj societoj, se oni pretendas la problemon solvi komplete. La problemo estas ia grava, kaj nepre dum la kongreso

laŭ vidpunktoj praktika kaj profitodona por nia movado devas esti pridiskutita. Laŭ direktivoj akceptitaj dum la kongreso, devos niaj ĉefaj instancoj solvi tiun aferon per bono de nia ideo.

Dum la kongreso ni festos la jaran jubileon de la Kolonja konsento. Tial ankaŭ ni esperas aŭdi pri la sukcesoj de la nova U. E. A., pri rezultoj, kaj ankaŭ ni volonte aŭdus pri eventualaj adaptoj de l' interkonsento al vivpostuloj de nia movado.

Decidan rolon havos la naciaj asocioj, kiuj jam reorganizis sin laŭ bezonoj de U. E. A. Trarigardante la novan statuton de U. E. A., ni kun ĝojo konstatas, ke la reformo baziĝas sur multjara sperto kaj certe plifaciligos la laboron de la Esperantistaro.

La polaj samideanoj partoprenos la kongreson eble ne tiel multnombro, kiel ili antaŭ unu jaro esperis. Ili ankaŭ ne restos dum la tuta semajno. Ekonomiaj cirkonstancoj kaj pasportaj malfacilaĵoj estas la solaj kaŭzoj.

Tiun mallongan tempon, kiun ni intencas pasigi dum la kongreso, ni esperas fruktodone eluzi por la bono de ĝenerala Esperanto-movado kaj de nia enlanda.

L. Kutscher.

Gesamideanoj interesataj pri la Stokholma ekskurso demandu al: Pollanda Esp.-Delegitaro, Kraków, Lubicz 34.

ALVOKO AL ĈIUJ AKTIVAJ ESPERANTISTOJ, KIUJ DEZIRAS HELPI INTER SKOLTOJ.

Mi salutas vin kiel agento de (S. E. L.) Skolta Esp. Ligo kaj esperas, ke vi legis kaj aŭdis pri la sukcesoj dum kaj post la skolta mondjamboreo, okazinta pasintjare en Hungarujo.

Dank' al fervora laboro de la hungara esperantistaro oni sukcesis tion atingi.

Ni sciigis, ke Esperanto ludis tre gravan rolon antaŭ kaj dum la jamboreo. Oni aranĝis Esp. tendarfajron antaŭ 2 mil personoj kaj Esp. kunvenon ĉeestis ĉirkaŭ 200 skoltoj el 24 landoj. Jamboreaj komunikoj, skolt-vortaro, kontlibreto, radio-paroladoj, poŝtkartoj k. t. p. enhavis Esp.-tekstojn. En multaj lokoj, kie deĵoris esperantistoj — bankoficejo, poŝto, polico, tendoj, tendar-pordegoj, jamborea-gazeteldonejo, vendejoj — ĉie pendis verdstelaj flagetoj kaj oni uzis Esperanton. Dum tendar-kunveno oni proponis rekomendi pli vastan uzon de Esperanto inter skoltoj, aperigi Esp.-paĝojn en la skolt-gazetaro, uzi Esp. ĉe skoltvojaĝoj.

Sed tiuj sukcesoj havos nur tiam valoron, se ankaŭ en aliaj landoj skoltoj lernos kaj korespondos kun siaj eksterlandaj gefratoj. Do via tasko estas la suprajn sukcesojn konigi al vialanda skoltaro, asocio, skoltrevuoj kaj instigi ilin, ke almenaŭ tiuj lernu, kiuj ne scias, kaj ne lernas alian fremdlingvon. Tian proponon certe ankaŭ pola skoltaro aprobos.

Kiel oni scias, la krakova mondkongreso estis la unua, kiu oficiale akceptis rezolucion pri skoltoj „ĉie forte helpi la propagandon inter skoltoj“. Kaj prave ni devas plej unue propagandi nian ideon ĉe movadoj, kiuj estas parencaj, tiam oni povas esperi pli multan komprenon kaj entuziasman sekvanton. Ĉu vi povas imagi pli utilan kam-

pon por la apliko de Esperanto ol entiel bele inspirita junularo, kies celoj multe similas la idealon akcelitan de la kreinto de Esperanto. Bedaŭrinde, la grandamasa skoltaro ankoraŭ ne komprenis la por si gravan utilecon de Esperanto, alimaniere la nombro da Esp.-parolantoj estus multe pli granda ol ĝi estas. Nur unu el milo da skoltoj parolas Esperanton, kaj la tutmonda skoltaro ampleksas pli ol du milionojn da knaboj! En Polujo mem estas preskaŭ 135 milanoj.

Estas do ĉies esperantista devo helpi enkonduki Esperanton en la skoltajn rondojn. Faru propagandon ĉe la skoltoj, vizitu la internaciajn tendarojn kaj serĉu tie la esperantistojn, kunigu ilin. Vi tuj vidus, kian bonan propagandon tio signifas.

Nunjare (16—31. VII. 1934) Slovakaj Katolikaj Skoltoj (Bratislava, Kapitulska 18), invitis al Bańska Bystrzyca (Tatry) ĉiujn geskoltojn scipovantajn Esperanton por aranĝi XII Internacian Skolt-tendaron. Ĉu multe da polaj skoltoj ĝin vizitos, tio nur dependas de nia forta propagando. Venontjare (aŭguste) tutslava jamboreo okazos en Kraków (Polujo). Ĉu ni atendu pli bonan okazon ol ĝi estas nun por enkonduki Esperanton al pola skoltaro? Ni devas jam nun fervore ekagi kaj vaste propagandi nian lingvon, por ke XIII Internacia Skolt-tendaro okazu en Polujo.

La skolta familio bezonas lingvon, por ke ĝiaj membroj interkonatiĝu — jen Esperanto!

Mi do turmas min al ĉiuj geesperantistoj kun varma alvoko, — diskonigu ĉi supran alvokon inter skoltoj ne esperantistaj, gvidu kursojn por skoltoj, fondu esp. rondojn — „Helpu la venkon de Esperanto!“

Emil Mayer

Kraków, Lelewela 9.

K L A R I G A R E S P O N D O.

En Pola Esperantisto Nr. 5, Majo 1934, sur la 68-a paĝo, en „Novaĵoj el Esperantujo“ vi sciigis viajn legantojn pri la fondo de Stenografita Instituto Tutmonda (S. I. T.) kaj por ĝusta informo, vi esprimis la deziron sciigi tion, kio estas S. I. T., kaj la simpligita stenografio esperanta „Metagrafio“? Kia estas la sinteno de S. I. T. rilate al „Intersteno“ ankaŭ in-

ternacia stenografia sistemo? Ĉu ankaŭ sur la kampo de stenografio estas bezona unuecigo? Vi mem esprimis precize tiujn du lastajn demandojn.

Permesu, ke ni kontentigu vian laŭdindan scivolemecon.

Multaj provoj estis faritaj, por doni al Esperanto taŭgan stenografion. Kelkaj originalaj sistemoj estis verkitaj, sed ne-

niu estas praktike uzata. Ni do ne parolos pri ili.

Ĉiuj — aŭ preskaŭ ĉiuj — naciaj sistemoj estas alfaritaj al la internacia lingvo. Nur malmultaj pli malpli disvastiĝis. Ili estas: la angla sistemo de Pitman, la francaj de Duployé kaj de Aimé-Paris; la germanaj de Stolze-Schrey, de Gabelberger kaj de von Kunowski; la nederlanda de Groote.

El ĉiuj sistemoj S. I. T. propagandas la ŝatindan sistemon de Duployé, kiu estas uzata en Belĝa, Franca, Luksemburga, Rumana kaj Svisa parlamentejoj, same kiel en multaj oficialaj institucioj, ekzemple en Alĝerio, Kanado, k. t. p., kaj disvastiĝis en multaj landoj.

La adeptoj de tiu sistemo fervore propagandas ĝin pro ĝiaj grandaj kvalitoj de simpleco, rapideco kaj legebleco, kiuj ebligas ĝin uzi por multaj celoj, aŭ profesiaj, aŭ personaj.

Ĝi konsistas el du gradoj: la elementa skribo, facile lernebla de plej junaj infanoj, reprezentas tre precize ĉiujn sonojn. Multaj samideanoj, kiuj nenion sciis pri stenografio, lernis tiun skribon sen helpo de kiu ajn profesoro en la daŭro de kelkaj tagoj, kelkafoje de kelkaj horoj. La supera grado nomita „Metagrafio“ ebligas facile trafi la plej grandajn rapidecojn.

Tia estas la sistemo propagandata de S. I. T. Por pruvi ĝian internaciecon, sufiĉas, se ni diros, ke fondita dum 1933,

S. I. T. jam havas delegitojn en 24 landoj.

La fondintoj de S. I. T. ne ignoras la aliajn sistemojn, kaj inter ili tiun nomitan „Intersteno'n“, pri kiu vi demandis.

Intersteno estas germana sistemo, kreita de l' fratoj von Kunowski, sistemo unue propagandita sub la nomo de „Nationalstenographie“ kaj fine sub tiu de „Intersteno“.

S. I. T. estas sistema sed ne sekta institucio. Se ĝi varbas nur por la sistemo, kiun ĝi konsideras plej taŭga, ĝi tre ŝatas la agemecon de tiuj, kiuj sindoneme propagandas por kia ajn alia sistemo; jam ofte ĝi pruvis tiun sinceran kolegecon.

Sekve S. I. T. tutkore deziras harmonii kun la adeptoj kaj societoj de ĉiuj aliaj stenografaj sistemoj.

Pri unuecigo: ĉiuj esperantistoj dezirus ĝin kaj volus havi nur unu skribon, same kiel ili havas nur unu lingvon. Bedaŭrinde ĉiuj, kiuj funde kaj senpartie ekzamenis tiun demandon, estas devigataj konfesi, ke tio estas neebla pro multaj gravaj kaŭzoj.

Ĉar S. I. T. ne estas komerca afero, ĝi volonte sendos senpage lernolibron al ĉiuj legantoj de **Pola Esperantisto**, kiuj volas lerni stenografion, kaj petos ĝin de: Stenografika Instituto Tutmonda, 9, Boul. Voltaire, Issy, Seine, Francujo.

La Estraro de S. I. T.

LEONO VIENANO.

LINGVA ANGULO.

(Daŭriĝo).

20). Ĉion diritan pri la verbo „deŝovigi“ anst. „deŝovi“ en la nro 19 de „Lingva angulo“ (ke „deŝovigi de sub la akseloj la bastonojn“ signifas: fari, kaŭzi, ke li deŝovu la bastonojn) oni devas ĝeneraligi pri multo da verboj uzataj multloke kun la sufikso „igi“, kiam la senco de l' frazo tute ne pensigas pri tia vortnuanco. En stranga kaj tute nekomprenebla maniero formiĝis ĉe multaj ia subkonscia opinio, ke verboj en Esperanto alprenas plejparte la sufikson „igi“. Tiel ni povas konstati, ke verboj, uzataj tute malkorekte kun la sufikso „igi“ svarmas en diversaj libroj kaj revuoj kaj ŝokas la impresigeman stiliston. Ek estas la impresio, ke la skribinto aŭ parolanto ĝuas la oftan uzadon de la menciita sufikso kaj kun ia neklarigebla kontenteco li

provizas per ĝi malavare multon da verboj, tute ne konsiderante la veran signifon de la jena sufikso. Ni prenu ekzemple la verbon „terurigi“, kiun mi trovis lastatempe en tradukaĵo, stile reviziita de speciala fakulo. Ekzistas adjektivo „terura“ — vekanta timon, timiga, kaj verbo „teruri“ — timigi. Do, „terurigi“ signifas — fari iun terura, fari ke li timigu. En la menciita tradukaĵo estas uzata la verbo „terurigi“ en senco de „teruri“. Do, io tute alia kaj vera intermikso de ideoj.

21). La sufikso „iĝi“ estas uzata en tri okazoj: I. por indiki, ke io aŭ iu estas farata ia aŭ iu, ekz. akriĝi, aniĝi. II por indiki la komencon de l' ago (simile al la prefikso „ek“) ekz. stariĝi-ekstari. III por anstataŭigi le reflektan pronomon

kaj iafoje la pasivon ekz. leviĝi — levi sin.

Malprave estas ankaŭ ĉi tiu sufikso misuzata kaj ofte trovebla ĉe verboj, kiam ĝi ne respondas la tri supre menciitajn kazojn. Plejparte sub influo de naciaj lingvoj ĝi aldoniĝas al verboj, kies traduko nacilingva enhavas la reflektan pronomon. Tia uzo estas ja kondamninda kaj pruvas pri malĝusta dependigo de la esperantaj vortformoj de nacilingvaj. Ekzemploj ne mankas, ilustru ĝin la jena: „diferenci“ signifas: „esti malsama“. Ĉi tiu verbo en Esperanto alie ol en diversaj naciaj lingvoj ne havas ĉe si la reflektan pronomon aŭ la sufikson „iĝ“. Kiam la lasta aperas, ĝi celas substreki la komencon de l' ago kaj samsignifas kiel „ekdiferenci“, sed neniam „diferenci sin“, kio estas en Esperanto nekomprenbla strangajo. Ĉi tiu verbo en sia korekta Esperanta formo („diferenci“) aperas en Zamenhofaj verkoj kaj nur tiaforme ĝi estas uzenda. Tiom pli forte surprizis min la rimarkigo, per kiu provizis piednote ĉi tiun formon la meritoplana kompilinto de la „Originala Verkaro“, ke „tiel“ (nome „diferencas“ ne „diferenciĝas“) estis en la teksto, lia opinie malkorekta, ĉar la korekta formo estas „diferenciĝi“. („Originala Verkaro“ pĝ. 92). Evidente preterpasis lian atenton la fakto, ke „diferenci“ estas la sola korekta formo Esperanta. Memkomprenble, ke pro tio la kompilinto mem uzas la malkorektan formon „diferenciĝi“ anst. „diferenci“ („Originala Verkaro“ pĝ. 17. linio 4. kaj aliloke).

22). „ne... plu“. La Zamenhofa uzo de la esprimo „ne... plu“ estas tia, ke la verbo disigas la du partojn, ekz. Li ne povis plu paroli. Sed tia vortordo tiom maloftiĝis ĉe la skribantoj, kvazaŭ estus tendenco spiti la spiriton de la lingvo kaj altrudi al la legantoj fremdlingvajn kutimojn. Mi ĉiam legas le menciitan espri-

mon en tia vortordo, ke ĝiaj ambaŭ partoj aperas unu apud la alia, ekz. Li ne plu povis paroli. Ni flegu kaj konservu la esperantan vortordon kaj ni skribu ĉiam, disigante la disigontajn: ne... plu. Ni ne skribu plu: ne plu.

23). La ĉefa vortoparto de kunmetaĵo estas ja la lasta. Tial estas ĉiam facila la ordigo de la vortopartoj en iu ajn kunmetaĵo. Tamen estas kunmetaĵoj, kies vortopartoj okupas jen la unuan, jen la duan lokon, ekz. „jarcento“ aperas ankaŭ en la malkorekta formo „centjaro“. Ni atentu, ke temas pri cent jaroj, pri cento da jaroj, tial korekta estas nur la kunmetaĵo „jarcento“. „Centjaro“ signifas: unu jaro el cent. Same „virŝafo“, ne: „ŝafviro“. Ŝafviro“ signifus: viro, havanta ŝafajn ecojn aŭ io simila.

24). En „Merkado la azenpelisto“ de N. Jeruŝalmi faris la tradukinto sintaksan eraron, kiun bedaŭrinde li kaj ĉiuj recenzistoj pretervidis. (Ĉu la alta nivelo de la libro malintensigis ilian lingvan viglecon?, sed por kio disfendi harojn ĉe ĝustajoj kaj pretervidi ĝustigataĵojn?) Mallongigi la frazon malĉefan per la adverba participo estas permesite en Esperanto kiel en la eŭropaj lingvoj nur tiam, kiam la subjekto en la ĉefa kaj malĉefa frazo estas la sama. Sur pĝ. 65 de la menciita libro ni legas: „starante tiel poĝrupe kaj interbabilante flustre, kompreneble, kaj timoplene pri la novaĵoj de l' milito atingis subite iliajn orelojn la malproksima kaj obtuza eĥo de la kanonpafoj“. En ĉi tiu kunmetita frazo ne estas permesite mallongigi la malĉefan frazon per adverba participo, ĉar estas en la ĉefa kaj malĉefa frazo diversaj subjektoj: 1) ili 2) eĥo. Do devas esti: „kiam ili staris tiel poĝrupe kaj interbabilis... atingis iliajn orelojn la eĥo...“

Samspeca sintaksa malkorektaĵo enŝteliĝis en la sama libro sur pĝ. 119. linio 6. kaj pĝ. 122. linio 24.

Kelkaj vortoj okaze de „Festo de l' Maro“.

De kiam ekzistas la mondo, ekzistas la homoj, la maro estas elemento adorata, antaŭ kiu kliniĝas en miro homaj fruntoj.

Dum longaj jarcentoj skribis poetoj, verkistoj pri ĝia potenco. Oni skribos pri ĝi, ĝis kiam la homaro daŭros kaj ekzistos. Sed nur tiu, kiu ekstaris apud ĝia bordo, kies pulmoj enspiris ĝian vivdonan blovon, kies oreloj atente aŭskultis la senĉesan bruon de la maro,

nur tiu komprenos ĝian ĉarmon kaj eternan potencon.

Rigardi la maron oni povas senfine.

Ĝi estas la ĉarmo mem, ĝuo kaj sano.

Nun venas libertempo. Ĉiu povas pasiĝi ĝin apud la marbordo, apud nia propra marbordo.

La Festo de la Maro estas unu el tiuj malmultaj festoj, kiuj malgraŭ nia tro-satigo per aliaj „festoj“ scipovas forkap-

ti la koron kaj ekparoli al plej vivaj kordoj de la animo. Sed kial?

Antaŭ ĉio la maro estas elemento por ni kvazaŭ tute nova kaj tial duoble alloga. Ni havas ĝin „nian propran maron“ de post nelonge kaj povas ĝin ĝui, admiri. Estas ĝi ja elemento belega, mirinda, same dank' al sia pentrindeco, kiel dank' al sia minaco kaj mistereco.

Ni konas ĝin malmulte, ĉar forŝovitaj malproksimen en la profundon de la kontinento, malofte ni ĝin vidadas kaj ankoraŭ pli malofte ĝin de la proksimeco ekkonas, malhavante okazon kunvivi kun ĝi kaj ĝiaj misteroj. Kaj tiu vivo estas supervorte alloga, ĉar same la naturo, kiel la ĥema vivo sur la maro kaj apud la maro prezentas ne kutimajn ĉarmojn kaj surprizojn, pri kiuj ni „ŝtoniĝintaj kontinentaj ratoj“ ne povas imagi.

Krom tio la maro estas superpreza trezoro, neelĉerpebla fonto de la riĉeco kaj forto por la ŝtato, por la socio, por ĉiuj kaj ĉiu. Sufiĉas mencii tion, kion jam plej penetremaj esploristoj de nia historio multfoje konstatis, ke la malzorgemo por la maraj aferoj kaj apatio por politikaj ideoj koncerne al maro fariĝis iam unu el plej gravaj kaŭzoj de la ruino de potenco de nia nun renaskiĝinta Respubliko

Kaj ĝuste la „Festo de la Maro“ celas la popularecon de tiuj ideoj. Ne sufiĉas, ke nur la Registaro kaj malgranda nombro da fervoruloj okupiĝas per organizado de la maraj aferoj. Tiu ideo devas fariĝi afero de ĉiu pensanta socio kaj tial ĉiuj aŭ almenaŭ la plej granda parto de la socianoj devas ekkon-

ni la maron kaj ĝiajn bordajn ĉirkaŭaĵojn.

Apud la limo de la libera urbo Danzig kuŝas en belega valo Orłowo, ĉarma anguleto por ripozi post tutjara laboro. Poste etendiĝas Gdynia, kiu kun nekredibla rapideco grandiĝis je fama havena urbo. Sur Kamienna Góra multaj belegaj, komfortaj hoteloj kaj vilaoj allogas la gastojn. Apud la maro kuŝas bela Jastrzębia Góra kun sunplana strandbanejo kaj arbaroj, apude Karwia. La duoninsulon Hel komencas nova Hallerowo kun varmaj banejoj kaj de tie disvastiĝas per unu zono ĝis la pinto de Hel grandega strandbanejo kaj multaj fiŝistaj vilaĝoj kiel Wielka Wieś, Chałupa, Kuźnice kaj ĝaja kaj granda Jastarnia. Nia marbordo posedas kelkajn lumturojn, el kiuj la lumturo en Zarzewie apartenas al la plej fortaj en Eŭropo. La duoninsulo Hel posedas fervojan komunikigon, du lumturojn, ofte vizitatajn de la gastoj, kiuj de ĉi tie povas ĝui la mirindan vidaĵon de la maro, sur kiu moviĝas grandaj ŝipoj kaj malgrandaj ŝipboatoj kaj super la akvoj suprenleviĝas ofte hidroplanoj de nia havenurbo Płock.

Do al tiu ideo de ekkonatiĝo kun nia maro estas dediĉita la momento de la Festo de la Maro. Estas ege necese, ke tiu mara ondo — en ĝia milda, bonfara formo superversiĝu je ĉiuj kontinentaj teritorioj de la Pola Respubliko, ke ekblovu favora „vento de la maro“. Tiu ondo forportu nin, tiu vento blovu super Polujo, ĉar tiuj elementoj estas niaj potenco kaj fiero. **N. Bertizanka.**

KOLEGIO DE INTERNACIAJ PRELEGOJ AKADEMIAJ

je la nomo de l' Unua Marŝalo de Polujo, Józef Piłsudski en Gdynia

sub egido de la Komisiono de Intern. Kunlaboro de Profesoroj kaj Docentoj de Juro Administracia kaj Politikaj Sciencoj.

Prezidanto: prof. Hipolit Gliwic, v. prez.: prof. Dr. R. Dominiak (Brno), prof. dr. K. Lastovka (Bratislava), prof. dr. Stainov (Sofia), Ĝen. sekr.: prof. dr. T. Hilarowicz.

La Kolegio ekzistas la III-an jaron. La prelegoj okazos de la 15. VII. — 1. VIII. 1934, en la ŝtata Marista Lernejo kaj Markomerca Instituto en Gdynia.

Programo de l' prelegoj.

I. Instituto por Sciencj Administra-

ciaj kaj Ekonomiaj prezid. prof. dr. T. Hilarowicz.

La prelegoj:

General - ekonomiaj problemoj, homa materialo en la internacia ekonomio, intern. karteloj, valuto, reformo de la komunumoj en Polujo, budĝetoj de komunumo kaj kultur-socia vivo, komparo de administracia procedo, ekonomiaj rilatoj: pol-ĉeĥaj, pol-rumanaj, pol-svedaj, Gdynia kaj la ekon. strukturo de Polujo, la ekon. vivo en Danzig, ŝtat-ordo en Ĉeĥoslovakujo kaj aliaj.

II. Instituto pri la Kulturo de Slavaj Popoloj.

Prez. Waclaw Sieroszewski, prez. de la Pola Akademia Literatura.

Prelegoj:

Etnografio de Pomeranio, familiaj kutimoj de slavaj popoloj. Historio, geografio kaj literaturo de Jugoslavio, literaturoj ĉeĥa kaj slovaka, literaturo ukrainia, socialaj problemoj en arkitekturo, la pola arto dekoracia de la XVII kaj XVIII jc. Socia k. kultura vivo de la junularo ĉeĥoslovaka. Altaj lernejoj en Polujo, protekto de naturo en la slavaj ŝtatoj, kaj aliaj. La prelegantaro konsistas el famaj scienculoj kaj profesoroj de la universitatoj polaj kaj de aliaj slavaj ŝtatoj.

Kondiĉoj: Aliĝo al ĉiu Instituto — 20 zlotojn polajn, al ambaŭ Institutoj kune — 30 zlotojn.

La aliĝintoj povos ricevi loĝejon kun tuttaga manĝo por 5 zlotoj tage. La partoprenantoj en la Kolegio ricevos fervoj-rabaton. Aliĝi povas: oficistoj, studentoj kaj aliaj.

Aliĝojn oni sendu je la nomo de la Instituto - Direktoro prof. dr. T. Hilarowicz, Warszawa (Polujo), Łowicka 51, m. 43.

Informojn petu de la Sekretariejo de la Ins. Warszawa (Polujo), Wspól-a 54, m. 3.
Henryk Gielb

Tilio.

Ĝi ĉiam staras ĉe gepatra sojlo
Kaj brakojn mole etendas al mi,
Gaja, largombra, densfolia verda
Neforgesebla maljuna tili'.

Ĝi ĉiam portas flavetajn floretojn
Kun bonodoro de l' freŝa miel',
Per ili mian kapon superŝuti
Plej grava ŝajnas por ĝi ĉiam cel'.

En ĝia ombro post longa vagado
Mi staras pale, — malŝparema fil' —
Kaj, kiel iam, plej strangajn baladojn
Ĝi rakontadas en la luna bril'.

Tili' maljuna! Mi jam ne komprenas
Misteran sencon de l' juneca kant',

Naivaj vortoj, vortoj ĉi infanaj
Jam perdis vorton por tra l' viv' migrant'.

Ie en granda homplena urbego
Muĝas maŝinoj, tremetas lampflam',
Flugilojn movas bird'-aeroplano,
Sonas radio, sonoras la tram'.

En flueganta homa riverego
Bolas doloro en soleca kor'
Iu ridetas, iu memmortigas.
Al iu brando fariĝas trezor'.

Ĉi kant' kruela, ĉi kant' de la vivo
Forton akiris nune super mi,
Mortis fabelo kun mort' de l' juneco
Mortis por ĉiam — ni vivas' tili'!

LENA.

AL LA INTERNACIA INSTRUISTARO.

Karaj gekolegoj (geinstruistoj kaj geinstruantoj)!

Estas nepre necese, ke ni por gravaj informoj al registaroj ktp. posedu fidindan materialon pri Esperanto-instruado en ĉiulandaj lernejoj

Pro tio mi kore petas vin, ke ĉiu, kiu kapablas raporti pri tio, kiel eble plej baldaŭ (ne prokrastu vian respondon pro la venontaj grandaj ferioj!) sendu al mi detalajn informojn pri:

- 1) Esperanto-instruado,
- 2) Esperanto-kursoj.
 - a) kiel deviga fako.
 - b) kiel nedeviga fako, sed enhavata en la instru-plano.
 - c) kiel tute privata afero.

Vi per tio faros grandan servon al la movado, por kies venko ni ĉiuj batalas. Mi estas certa, ke vi volonte oferos por

la bona afero ankaŭ la necesan poŝtmarkon.

Krome mi estus tre danka al vi, se vi samtempe sciigus al mi la kompletajn adresojn de 2 aŭ 3 knaboj kaj knabinoj el via lando, 12—15-aĝaj, inteligentaj, sinceraj kaj precipe fidindaj, kiuj scipovas Esperanton. Mi projektas kun ili gravan eksperimenton rilate al internacia korespondo - perado.

Mi ankoraŭfoje petas vin korege, ke vi subtenu ĉi tiun laboron per baldaŭaj multnombraj respondoj.

Kun kora antaŭdanko salutas vin
Marta Moelke
sekretariino de Kunlaborado de IALA
Hünensteig 8. a.
Berlin-Steglitz (Germanujo).



Ekskurso tra Londono, la 8-miliona ĉefurbo de la mondo.

Londono estas la plej granda kaj tre interesa urbo en la mondo. Tiu grandega ĉefurbo en Eŭropo estas vere interesa, precipe por turistoj, kiel la 8-miliona urbo de la dissemitaj sur la tuta terlobo anglaj kolonioj kaj dominioj.

Al la ĉefurbo de Granda Britujo ni alvenis el Holando per la ŝipo „Polonja“: Ĝi lokiĝis sur Tamizo apud haveno Greenwich Pier. De la haveno al la ŝipo kaj reen ni veturis per motor-boato. Du horojn ni veturis per la ŝipo, rigardante Londonon kaj la havenojn, ĝis ni alvenis al la loko.

En la Londona haveno oni vidas tiom da internaciaj ŝipoj, vaporŝipoj kaj jahtoj, ke ĝi impresas kvazaŭ ŝip-arbaro.

Sur la haven-stacio atendis min Londonaj esperantistoj ku la konata esp-isto Bernard Long, Prezidanto de B. E. S., post koraj salutoj ili oferis sin por gvidi nin tra la urbo. Unu el la anglaj esperantistinoj, simpatia fr. Bella Klarfeld, fervora esp.-turistino, dum nia ĉeesto en Anglujo tre kompleze servis al ni, montrante ĉion vidindan kaj vizitindan en Londono. Ni interkompreniĝis bonege per Esperanto, kio montras al ni ĝian utilon por turisto en fremda lando. De la haveno ni veturis per subtera fervojo, tramo kaj aŭtobuso al la urbocentro. La veturo daŭris ĉ. 1 horon.

Tuj post alveno en Londono ni vizitis la urbon: vicon da plej interesaj, plej viglaj stratoj, kiel: City Oxford, Fleet Street, Strand, Charing Cross, Trafalgar Square, Picadilly ktp. Poste la kinojn, teatrojn, restoraciojn. Ni observis la noktan vivon en la stratoj de Londono, kaj la lum-reklamojn, ekscitantajn per helaj iluminaĵoj.

Ni eniris la plej grandan, elegantan kafejon — Lyons Corner Hous. Tiu firmao posedas kelkcent filiojn (kafejojn) en Londono, kaj kelkmil kafejojn en la provinco. Ne estas urbo aŭ vilaĝo en Anglujo, kie Lyons ne estus reprezentita. En tiu kafejo troviĝas multe da elegantaj salonoj, kie la muziko ludas. Granda movado, kaj ĉie regas la karakteriza anĝla trankvilo. Plej interese estas, ke tiuj kafejoj estas malfermitaj seninterrompe tutan tagon, kaj dum la 36 jaroj de ilia ekzistado ili ne estis fermitaj (post ĉiuj 8 horoj la servistaro ŝanĝiĝas).

Tie ankaŭ ni vidis la grandan kinejon „Empire“ kun aŭdantejo pod 5.000 pers.: ega, impona enirejo, luksaj atendejoj, en la foyer aranĝita eleganta kafejo kaj legejo; en la atendejo kuŝas tapiŝoj je valoro de 8—10.000 funtoj; la konstruo de tiu ĉi kinejo kostis ĉ. 1 milionon da funtoj sterl. La kinejo funkcias de 10 h. matene ĝis 2. h. post noktomezo; ĉiu — 3-hore okazas prezentado kun artista koncert-programo. Similajn kinejojn kaj kafejojn oni multe trovas en Londono.

La ceterajn tagojn ni vizitis la plej interesajn objektojn en la urbo; vicon da bonege konservitaj monumentoj de la pasinteco, kiel, la majestan Westminster Abatejon, la reĝan palacon de Saint James, Buckingham Palace, National Gallerie. Katedralon de Sankta Paŭlo, Monumenton de la Neknata Soldato kaj la faman London - Turon. La Turo (Tower) estas malnova londona kastelo, konstruita en la jaro 1078 de Wiliano la Konkerinto por defendi la urbon. Dum multaj jarcentoj en Tower oni kronis reĝojn, tie ankaŭ reĝoj estis malliberigataj aŭ eĉ senkapiĝataj. Tre interesa estis por la vizitantoj la trezorejo en Wakefield Tower: belegaj oraj kronoj, grandaj brilantoj kaj aliaj kron-juveloj.

Admiron elvokas ankaŭ sekvantaj londonaj kuriozaĵoj: la plej granda zoologia ĝardeno, akvario, fama internacia muzeo de vaksaj statuoj — muzeo de teruraĵoj de diversaj landoj. Precipan atenton elvokas la konstruaĵo de la angla parlamentejo kun la fama horloĝo Big Ben. Ni vizitis ankaŭ la Hyde Park, Regenspark kaj aliajn ĝardenojn.

Tre interesa kaj atentinda estas la plej granda muzeo en la mondo, la fama British Museum. Tiu konstruaĵo posedas ĉ. 100 ĉambregojn. Preskaŭ ĉiuj arkeologiaj objektoj, eĉ la plej grandaj, kiel strat-monumentoj, mumioj k. t. p. troviĝas tie en natura grandeco, kaj ne kiel en aliaj similaj muzeoj — en miniaturo kaj kopioj. Mem la biblioteko en British Museum enhavas ĉ. 5 milionojn da libroj de la monda literaturo kaj ĉiujare pliĝas ĝia cifero je 100.000 ekzempleroj. Por bildigi tiun eksterordinare grandan bibliotekon sufiĉas aldoni, ke se oni lokigus ĉiujn ĝiajn librojn sur unu surfaco

unu apud la alia, ĝi okupas spacon de ĉ. 100 kv. klm.

Poste ni vizitis la komercan kvartalon (ne etas tie entute privataj loĝejoj) en kiu troviĝas nur vendejoj kaj magazenoj. Troviĝas tie grandaj komercaj-domoj. Mem la Selfriĝes-House okupas ĉ. 10.000 da oficistoj. Por la aĉetantoj estas tie aranĝitaj 2 bridge'-kluboj kun ĝardeno, 2 kafejoj k. a. distraĵoj. Tiu ĉi komerca societo troviĝas en 7-etaĝa konstruaĵo: 3 etaĝoj troviĝas sub la tero kaj 4 super la tero. En Anglujo ne estas „nub-skrapaĵoj“, oni prefere konstruas profunde en la tero, ol alte sur la surfaco: la konstruaĵoj havas sian apartan stilon. Imporan konstruaĵon havas la mon-borso. Dum la kunvenoj troviĝas tie 5—6 mil homoj. La mondaj, famaj bankoj kaj la Bank of England troviĝas sur la Lombard Street, kiu estas la plej riĉa strato en la mondo.

La mondaj asekur - societoj, aliaj financaj institucioj kaj profesioj ankaŭ havas siajn konatajn stratojn. La gazet-redakcioj troviĝas precipe en unu kvartalo. La gazeto „Daily Ekspres“ eldonas tage 2,300.000 ekz., „Dailly Herold“ — 2 milionojn, The Times — ĉ. 1 miliono tage.

Ni multon vidis, sed pli multe ni ne sukcesis viziti. La mar-ekskursoj havas grandan valoron kaj meritojn por la turismo. Sed ĉefa manko estas, ke malmulte da tempo oni dediĉas por viziti la urbojn, kio okazas tre supraĵe.

Dum la ekskursoj ni veturis per aŭtoĉaroj de „Orbis“, subtera fervojo (en Londono funkcias kvar subteraj fervojoj, kiuj veturas unu super la alia), poste per aŭtobusoj, tramoj k. t. p.

MINUSKA MANTEL (Lwów).

KUN LA VERDA STELO

Estas facile konjekteble, ke la verkaĵo ekestis sur laŭdinda principo: „Mi ne ŝatas troiĝon...“

La Red.

Tak... tak... ritme aŭdiĝas la klavoj de mia skribmaŝino.

Tik... tak... kantas mia horloĝo... antaŭen marŝadas la montriloj...

Iu delikate frapas mian hejman pardonon, enŝovas leteron... blankan, enigmoplene aspektantan leteron. Jen invito al Krakovo, al urbo de bela Wawel, de Vistulo, al urbo de verdaj ĝeamikoj... invito al „Viena Vespere“.

Tik... tak... ritme batas mia koro, ĝojtrilon eligas mia gorgo.

Vojaĝi!

Pri la grandeco de Londono atestas sekvantaj ciferoj: oni devas veturi 35—40 klm. por ĉirkaŭiri Londonon laŭlonge. (? Red.). Aŭtobus - linioj estas tie 583. tram - linioj — 175. aŭtobusoj — 5.000. taksioj — 8.000. En Londono estas tre malmulte da taksioj, tamen estas tie 2 milionoj da privataj aŭtoj (ĉiu kvara londonano havas propran aŭton) krome estas 2.000 tram-vaĝonoj. La ĉefurbo posedas 17 grandajn pontojn kaj 3.000 preĝejojn.

Karakterize estas, ke ofte dum gardostaro la milististaro estas vestita en grandaj ursaj ĉapeloj kaj pezaj, ruĝaj uniformoj, tamen tre elegantaj. La angla milististaro impresas kvazaŭ fabel-armeo. Ni adiaŭis Londonon, forportante kun ni multajn impresojn kaj agrablajn memorojn. Lulis nin la mar-ondoj. La ĉielo estis sennuba. Ni reveturis per „Polonia“ ne tra Holando, sed Norda Maro, poste senpere per Kilona Kanalo, Brünsbutel kaj Holtenaŭ. La vojaĝon ni pasigis plezure, rakontante al si pri la travivitaj impresoj. Fine okazis la tradicia kapitanbalo, kiu daŭris en bonega humoro ĝis malfrue en la nokto.

La sekvantan tagon ni alvenis en Gdynia. En la pola haveno oni akceptis nin kun muziko. Dum la dogan-revizio ĉio pasis sen malfacilaĵoj, kaj la kunveturantoj forveturis en siajn hejmojn. Sed la impresoj ĉiam denove reviviĝas ĉe ni.

La beleco de la naturo kaj la anima kontenteco apartenas al tiuj, kiuj ĝin deziras, zorgas pri tio, kaj etendas la brakojn, amantajn sunon, akvon kaj aeron.

Oskar Berman

ĈE „VIENA VESPERO“.

Brilas la okuloj, ardas la vangoj.

Vojaĝi, kia plezuro!

Kofro rapide pakita. Ĉapon sur kapon, lumbildkliŝojn sub brakon, sur la mantel-buton-truon signon de Zamenhofa — ideo. — Stacidomo — la fera monstro plenpulme spiregas... kŝŝŝ... elsiblas la vaporo... forta ekpuŝo... akra ekhurlo... lasta tuksvingo...

Al Kraków! kantas la sirenoj...

Al Esperantistoj! ritme luladas la radoj. Preterflugas stacioj, blankaj, florornamitaj dometoj... muĝantaj ĝrenkampoj... „sinjoro cikonio“ staras sur unu piedo... digne... mediteme.)*

La subiranta suno trempas la pejzaĝon

en fluantan oron... delikata vento karesas la ardantajn vangojn.

Kraków.

Homamasoj, krioj, muĝanta movado.

Heroe mi premas kofron, lumbildkliŝojn, pluvombrelon, libron, gazeton.

Jen: hura! Verda kavaliro **Dr. Janczalek** remadas tra l' ondoj de ekscito... ek-kaptas decide miajn „vojaĝilojn“ kaj antaŭen puŝiĝas...

Estas 6-a horo vespere.

Ĉe l' „komenco de Krakovo“ — verdaj „ĝefloroj“ la temperamenta, ĉiam gaja sinjorino **Srebrna**, la afablega, fama kunlaborantino, muzik-profesorino **Nusia Bertizanka**, konata al mi el „Pola Espisto“, la interesvizaĝa, eleganta **Hanka Kantorowicz**, „E-Mc“-Mayer, la diligenta S. E. L. gvidanto — kaj — la Lwo-wa fama aranĝanto de grandstila „Viena Vespere“ — redaktoro **Henryk Schnützer**.

Ripozo en mola, verda nesteto, en la hejmo de mia aminda nova amikino **Nuŝeto Bertig** — ĉirkaŭita de bonkora, ĉarma patrineto ŝia — mi revadas...

Post horo de ripozo... enspiro de freŝa aero en la plantacioj Krakovaj.

Regas la verda temperamento, ridtrilo vibras en lunlumo.

Ĉe kafo, viena valso kaj verdaj dolĉaj vortoj mi konatiĝas kun nia estimata sinjorino **Julja Neberg**, fervora kunaranĝintino de l' Kongreso Krakova. Enpaŝas nia konata verkistino fraŭlino **Irena Szcze- pańska**, kiun mi plezure salutas... kaj kies libron „Słońce w białym dworze“ mi kun afabla dediĉo ĝoje akceptas.

Enpaŝas la blankbarba, dignoplena, timiĝa gardanto de ampleksa Krakova monujo, s-ro **Ludviko Kutscher**, kies okulvitroj akre brilas...

Jen: kalemburon-ŝatantan **Leoturnan-**tan, spriteĝon-ŝprucigantan **Lingvan-Ko-**tatanon, **Dr. Dreher** mi premas al mia verda koro.

Dum la „Viena Vespere“ plenumiĝas fine miaj ardaĵoj sopiro kaj deziro: ekkonatiĝi (kun nia amata Esperanto-patro **Profesoro Dr. Odo Bujwid**. Pro ekscito mi tremas... sed la milda, afabla rideto tuj malaperiĝas timon...

Ho, dediĉvortoj de nia Pola Gvidanto en mia memorlibreto!

Ĉe l' komuna vespermanĝo mi konatiĝas kun fraŭlino **Vic-Delegitino Rena Weinsberg**, kaj kun la senlaca laboranta, fervora s-ro **Mgr. Tydor**, sinjoro **Wiesenberg**, Delegito de U. E. A. Alpaŝas s-roj **Zajączkowski**, **Eli**, la fervoraj membroj de „Societo Esperanto“.

8 tagoj neforgeseblaj...

Lastaj momentoj, plenaj de emocio... adiaŭo de miaj amikoj Krakovaj.

La florojn de sinjorino **Srebrna** mi premas al miaj larmantoj okuloj... sendas lastan saluton el ekmoviĝanta trajno...

tik... tak... batas mia koro

tik.. tak... kantas mia horloĝo

Pretersiblas stacioj... **Tarnów**.

En sunradioj trembriletas verda stelo — alten svingas flageton la belokula, majstre Esperanton paroladanta U. E. A. Delegitino **Irena Traumówna!** Kun peza koro mi adiaŭis min...**) obeante la fajfantan feran ĉevaleton.

Preterflugas stacioj, blankaj florornamitaj dometoj... muĝantaj grenkampoj... sinjoro cikonio staras meditema, dignoplene...****).

La subiranta suno orumas la pejzaĝon... La radoj luladas

„Ĝis revido en aŭtuno dum la E-semajno“.

**) Ĝis nun neniu, eĉ la plej aĝaj espistoj, vidis s-ron K. kun blanka barbo. Scivole ni demandis lin: ...ĉu vere? Sed li asertas, ke ankaŭ dum maskobalo ne!

*) Kial ĝi enmeditiĝis?

**) Kion faris dume la venintino?

****) Ĉu la sama?

OOMOTO INTERNACIA.

Ĉu vi jam konas la plej pitoreskan organon en la Esperanta gazetaro aperantan en Japanujo? **Oomoto Internacia** aperas regule ĉiumonate, sur 32 grandformataj paĝoj: ĝia kovrilo estas dukolora, japaneca; ĝi enhavas diversajn interesajn ilustraĵojn, seriozajn kaj bonstilan artikolojn. Literatura Kritiko, Japana Humoro, Kompara Religiscienco, Paĝo de Spiritismo, La filozofio de Oomoto, Japana Lingvo por Esperantistoj: jen estas nur kelkaj el ĝiaj rubrikoj.

Kompare al ĝia amplekso, **Oomoto Internacia** estas la plej malkara el ĉiuj Esperanto-gazetoj. Internacia redakcio — internacia legantaro: jen ĝia devizo. Oriento kaj Okcidento, unuigite per Esperanto. Ĉiu vera Esperantisto devas legi la oficialan organon de **Universala Homama Asocio**.

Sendu vian kotizon (5 svisajn frankojn aŭ egalvaloron por unu jaro) al **Oomoto Internacia** — **Kameoka**, Kioto-hu — Japanujo.

POLLANDA KRONIKO

Bydgoszcz. „Dziennik Bydgoski“ aperigadas daŭre Esp-angulojn. Inter aliaj interesaj novaĵoj aperis en ili ampleksa raporto, verkita de s-ro prof. Sygnarski pri la Viena konferenco. — Esp.-Societo aranĝis ĉefkunvenon, dum kiu oni reelektis s-on E. Fethke prezidanto.

„VIENA VESPERO“ EN KRAKÓW.

Instigite de Lvova bonsukcesa, grandstila „Viena Vespero“ okazis, dank' al la fervora komuna laboro de Krakovaj Esperantistoj, ĉefe de nia estimata Sinjoro Profesoro Dr. Odo Bujwid, sub protektorato de s-ro Urb-Prezidanto **Mieczysław Kaplicki** la „Viena vespero“,

la 26. de majo 1934,

kiel eĥo de Esperantista Mondkonferenco en Wien.

La „Vianan Vesperon“ malfermis la estiminda pola esp.-gvidanto, Profesoro Dr. Odo **BUJWID**, raportinte interesajn faktojn pri la Viena mondkonferenco.

Salutojn el Wien kaj blua Danubo transdonis la bonkonata Viena Esperantistino f-ino **Minuška Mantel**.

Ĉarmis per majstra pianludo la talentoplana 10-jara Halusia **Schwarzenberg-Czerna**, tondre aplaŭdita de multnombra aŭskultantaro.

Multe plaĉis la dialogita legendo pri la Stefana Turo, verkita de la krakova literaturistino **Irena Szczepańska** plenumita de la aŭtorino kaj la kapablega, ĉarma fraŭlineto **Roma Manberówna**.

La konata **Wachsmann-baledo**, konsistanta el ĉarmaj, lertaj dancantinoj, plejparte infanoj, elvokis admiron de la ravita publiko.

Favore akceptitaj kaj danke aplaŭditaj estis la belaj Vienaj kantoj de la juna Viena operetkantistino fraŭlino **Haendel** kaj la beleŝaj prezentadoj de la konata Krakova Film - aktorino **Ankwicz-Szykowska**.

Pianakompanis s-ro Profesoro **Wallek-Walewski** kaj s-ro Richard Gert.

Tondraj, senfinaj aklamoj de la ravita publiko montris al la aranĝantoj, ke ili lerte kaj bele reprezentis,

Vianan urbon kaj Vianan muzikon.

Lunde, la 28. an de majo okazis en Industria Muzeo

„Gaja Promenado tra Wien kaj vojaĝo tra Aŭstrio“

gvidita en ĉarma maniero per lumbildoj de f-no **Minuška Mantel**.

Lwów. Preterpasontaj nian urbon samideanoj bonvolu 2 tagojn antaŭe sciigi Dr. Karol Klein Del. de UEA. ul. Leona Sapiehy 24, aŭ f-inon M. Mantel V. D. U. E. A., ul. Janowska 109. Ambaŭ Delegitoj stacidomservas, gvidas dum restado.

Nowogródek. En „Gazeta Nowogródzka“ Nr. 5 aperis artikolo de s-ro inĝ. Chmieliński pri Esperanto.

Tarnobrzeg. Finiĝis bonsukcesa kurso de 18 gimnazianoj, gvidita de s-ro **To-czyski**.

Wilno Lastatempe estas en nia ŭrbo organizitaj du grandaj ekspozicioj: de afiŝoj, plakatoj de internaciaj foiroj kaj de sporto - turismo. La esperantista Rondo ĉe Vilna Juda Turista S-to (Z. T. K.-TERC) pruntis al direkcio diversajn ekspoziciajn materialojn (afiŝojn, plakatojn, gvidlibrojn ktp.) en esperanta lingvo, kio estis bonega propagando por niaj ideo kaj lingvo en Vilno. Nian lastan esperantan kurson, gviditan de S-ano S. Szyk laŭ rekta metodo, finis 20 ĝelernantoj, kiuj nun vizitos la klubon de Vilna Esp. S-to „Universo“.

Jus aperis la senpacience jam atendata
11-a eldono de
BES-ADRESARO

de esperantistoj el ĉiuj landoj kun pli ol 1.000 adresoj kaj preskaŭ 100 portretoj de E-istoj el pli ol 40 landoj, kun detala registro de aliĝintoj laŭ profesio, inklinoj kaj fakoj, tiel ke ĉiu tuj povas trovi la deziratan adreson! Tiu ĉi belaspekta, modele aranĝita broŝuro, kiu enhavas kun bilda, registra kaj anonca partoj 110 paĝojn, estas bezonega kaj unika helpilo por ĉiu esperantisto kaj kostas sole 1 Fsv = 1.8 p. zł. (4 resp. kup.) aŭ egalvaloron. Ricevebla en ĉiuj E-librejoj, ĉe niaj reprezentantoj aŭ rekte ĉe l' eldonejo

BES (Boh. E-Servo), POTŠTEJN
Ĉeĥoslovakujo.


Aliĝoj por la nova, 12-a eldono, estas jam akceptataj. Aliĝa kotizo kun senpaga adresaro estas sole 1 Fsv, publikigo de portreto kostas 0.50 Fsv. — Ĉiu deka aliĝonto ricevos premion en la valoro de 1 ĝis 25 Fsv. — Postulu senpagan, 12-paĝan ilustritan prospekton, kie vi trovos detalaĵojn pri ĉio!

Reprezentanto pod Poluio: J. Zawada, Warszawa, Nowogródzka 19/25.



En la nuna numero ni prezentas lastan serion de enigmoj de la III. Konkurso. La enigmoj 10, 11, kaj 12, valoras po 2 punktoj, la enigmo 13 — 3 p. La solvojn ni petas sendi ĝis 15. VIII. k. j. En la plej


10. LISTEL-ENIGMO.



a, b, c, d, e, e, e, k, l, l, m, m, n, o, o, o, o, o, o, o, o, p, p, r, t, u, v, v.

Signifoj de l' vortoj: En la meza horizontala vico — Pafaĵo; en la vertikalaj vicoj — 1. nombro, 2. preparaĵo, 3. cifero, 4. frukto, 5. adverbo, 6. konstruaĵo, 7. besto.

12. LITERKRUCO.




a, a, a, a, d, d, e, e, e, e, e, g, g, i, i, i, l, l, n, n, o, o, o, o, o, o, o, o, o, o, p, p, r, r, s, s, s, s, s, s, t, t, t, t, t, t.

La unua vorto horizontale kaj vertikale signifas: konatan lingvon; la dua vorto — scienculon; la tria — feliĉan homon.

proksima numero de „P. E.“ kiu aperos post la ferioj, ni publikigos rezulton de la Konkurso. Aŭtoro de la enigmoj estas s-o Bruno Reichberg, Riga, Latvio.


11. KRUC-HOMOGRAMO.



e, e, e, f, i, i, i, l, l, n, o, o, o, o, r, r, r, s, t, t, t, u, v, v.

La du vortoj horizontale signifas: tempo kaj personon; la vortoj vertikale — parton de domo kaj ilon.

13. MONUMENT-ENIGMO.



a, a, a, a, a, c, ĉ, d, d, e, e, i, i, j, k, k, k, l, l, m, n, n, n, n, o, o, o, o, o, o, o, o, o, o, o, r, r, r, t, t, u, u, z.

La vortoj en la meza vertikala vico signifas: parton de la konata maro; la vortoj en la horizontalaj vicoj — literon, adverbon, akvon, kanton, literon, ciferon, beston, manĝaĵon, birdon, instrumenton.

ADRESOJN de esperantistoj kaj de ĉiuj E-entreprenoj, de firmoj kaj hoteloj uzantaj E-on, kolektas por sia „BES-Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj, Ing. L. Berger, POTŠTEJN, Ĉeĥoslovakujo. — Skribu tre legeble la adreson!

S-ano Jan Krause (Chojnice, Pom., Krajobe Zakiady Opieki Społ., Dom Pracy Dobrowolnej) — senlabora depost 2 jaroj kompostisto-linotipisto petas helpon trovi al li laboron.

Veturonta Palestinon deziras korespondadi kun elmigrontoj kaj kun palestinaj gesamideanoj. Erna Finkelkraut, Warszawa, str. Polna 66. m. 1. Polujo.

Skoltan tendaron de 16. VII.—31. VII. k. j. aranĝas Esp.-fako de centro de slovakaj katolikaj skoltoj. Loko de l' tendaro: Banská Bystrica — meze de Slovakujo sub montaro Tatry ĉe rivero Hron. Adreso de prepara komitato: Bratislava, Kapitulska 18, Ĉeĥoslovakujo.

RECENZOJ.

„Lingva kvaronhoro“. Lingvaj problemoj traktitaj kaj klarigitaj de P. Nylén. (En sveda lingvo).

La Stokholma Esperantogrupo de kelkaj jaroj praktikis ĉe siaj kunvenoj „lingvan kvaronhoron“, kiam ĝia lingva spertulo, membro de Lingva Komitato kaj vicprezidanto de la Akademio Paul Nylén klarigis problemon, kiu povas doni malfacilaĵon al la nelertaj esperantistoj. Tiuj lingvaj kvaronhoroj estas tre ŝatataj kaj s-ro Nylén nun kolektis kelkajn el siaj temoj kaj lia libreto estas envicigita en la serio de Sveda Esperanto-Federacio, kiu trovis plej varman akcepton. La deziro de la verkinto kaj la eldonintoj estas, ke la libro instigu al la grupoj ĉie en la lando (kaj en la tuta mondo) sekvi la ekzemplon donitan. Krome, la libro estas tre valora por studentoj de la lingvo sed precipe por la kursgvidantoj, kiuj sentas bezonon de helpo je klarigo de certaj detaloj kaj bezonas por tio bonajn ekzemplojn.

„Per kio ni amuzu nin?“ Societo- kaj dancludoj. De Jakób Rozenberg kaj Ernfrid Malmgren.

La tri unuaj numeroj de la tre valora serio de praktikaj manlibroj eldonata de Sveda Esperanto-Federacio pritraktis la seriozan laboron de la Esperanto-grupoj. Sed ni devas ne nur labori, sed ankaŭ amuziĝi. Se la grupkunvenaj programoj ofte estas tre „malĝrasaj“ rilate al pro-

paganda kaj instrua laboro, ili ofte estas senenhavaj rilate al amuzigo de la grupoj. Ni ne estu ĉiamaj gravmienuloj, ĝojo kaj gajo regu en la esperantistaj rondoj — post la laboro.

Plej valoraj estas amuzajoj, kiujn partoprenas la anoj mem. Ne nur komuna kantado estas ĉiam praktikinda, sed ofte oni povas aranĝi ankaŭ societoludojn aŭ liberaerajn ludojn. En tiaj okazoj la libro de Rosenberg-Malmgren estas valora helpilo. Se oni uzos la enhavon de tiu libro, oni „lernas dum oni amuziĝas“.

Ĉiu volumo kostas 1 sv. kr. Ili estas riceveblaj ĉe Eldona Soc. Esperanto, Poŝtfako 698, Stockholm 1.

LA ESPERO KAJ LA TAGIĜO SUR GRAMOFONDISKO.

La plej multe konataj kaj ŝatataj esperantaj kantoj, La Espero de D-ro Zamenhof kaj La Tagiĝo de Antoni Grabowski nun estas haveblaj sur gramofona disko eldonita de Eldona Societo Esperanto, Stockholm. Prezo sved. kr. 3.50.

La diskon surkantis juna sveda operetkantisto Gösta Kjellertz. La vigla takto donas vivon kaj entuziasmon al la kantado. Certe tiu disko ne nur ŝuigis niajn samideanojn, sed ĝi ankaŭ instigis al pli ofta kantado, precipe en grupaj kaj publikaj kunvenoj. Kun vera ĝojo oni devas saluti tiun novan diskon, kiu tre longe malestis.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660

Drukarnia L. Gronusia i Ski, Kraków, ul. Stolarska 6.

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss.

K U P O N O - N - R O 4
P O R
I I I E N I G M O K O N K U R S O .